KIEL KANDIDATIĜI POR LA IJK

Verkita de David-Emil Wickström

Versio: 1.20

Laste ŝanĝita: 24.08.2006



PEPO

Enhavo

Saluton! 1

Kio estas IJK 1

Kion vi povas atendi de TEJO 1

Kion TEJO atendas de vi 2

Buĝeto 2

Kiel kandidatiĝi 3

Raporto 4

Utilaj retpaĝoj 4

Anekso A: El la TEJO-regularo: ĈAPITRO 7 - INTERNACIA JUNULARA KONGRESO 5

1. Okazigo kaj karaktero 5

2. Invito 5

3. Kongresa kontrakto 5

El reglamento pri la estraro 5

6. Repago de kostoj 5

Anekso B: Modelo: Kontrakto inter UEA / TEJO kaj LKK por IJK 20XX 7

Art.1. Ĝenerale 7

Art.2. Financoj 7

Art.3. Aliĝkondiĉoj 8

Art.4. Komunikado inter TEJO kaj LKK 9

Art.5. Disdivido de respondecoj 9

Art.6. Finaj vortoj 9

Anekso 1 – Respondeculoj flanke de la LKK 11

Anekso C: Fina Raporto de la Komitata Laborgrupo pri Kongreskotiza Sistemo 12

Enkonduko 12

La antaŭ-historio 12

Konkludoj de la laborgrupo 12

Proponoj de la laborgrupo 14

Saluton!

TEJO ege ĝojas ke vi interesiĝas pri organizado de la Internacia Junulara Kongreso (IJK), la plej grava internacia junulara kongreso ene de Esperantujo. Kiel vi verŝajne jam scias, ĝi okazas ĉiujare en alia lando, kutime en julio aŭ aŭgusto, organizata de unu el la landaj sekcioj de TEJO aŭ grupo de junulaj aktivuloj. La IJK estas aranĝo kie la landa sekcio helpas TEJO-n en sia internacia agado.

Kio estas IJK

La IJK estas la plej grava aranĝo de TEJO kun ampleksa programo. Ĝia ĉefa celo estas kunigi junulojn el la tuta mondo dum unu semajno por ke ili amuziĝu, laboru kaj interkompreniĝu uzante Esperanton.

La kongresa programo konsistas el tema programo kun eroj rilataj al la IJK-a temo, el distra programo kun distraĵoj kiel danckursoj, maltemrilataj prelegetoj, lingvaj kursoj ks., kaj el vespera programo kun koncertoj, teatraĵoj kaj la interkona kaj internacia vesperoj. Nokte kutime funkcias diskoteko, trinkejo kaj gufujo (te-ejo, kie malpermesatas fumi kaj drinki alkoholon). Sed IJK ankaŭ ebligas la organizantojn montri sian landon kaj ties kutimojn kadre de ekskursoj, naciaj vesperoj, manĝoj ks.

IJK ankaŭ gravas por la movada laboro. Dum la IJK okazos kunsido de la TEJO-Komitato, la plej grava decidorgano de TEJO. La Komitato traktas interalie, kie la sekvaj IJK-oj okazos, kian agadon TEJO havu, kaj urĝajn movadajn problemojn. Ĉiun malparan jaron ĝi ankaŭ elektas novan Estraron. La Estraro estas la gvidanta organo de TEJO. Aldone TEJO klopodas aranĝi aktivulan trejnadon dum la IJK por plispertigi siajn membraron kaj aktivulojn.

Kion vi povas atendi de TEJO

Kompreneble, se vi decidas organizi IJK-n vi ne estos sola en via laboro. TEJO apudas vin kaj pretas konsili kaj transdoni spertojn rilatajn al organizado de la kongreso. Por spertiĝi vi ankaŭ havas la eblecon fariĝi volontulo dum la IJK okazanta antaŭ via IJK. Estas utilega sperto vidi, kiel homoj organizas aranĝon, kaj kunhelpi.

Aldone TEJO helpas en la varbado por la aranĝo tra siaj kanaloj (TEJO Tutmonde, TEJO Aktuale, Kontakto, retejo ks.).

Rilate al informado, vi ankaŭ havos (tuj post la fino de la IJK antaŭ via) aliron al la retadreso www.tejo.org/ijk kaj al la ligitaj retadresoj @tejo.org. Ili konsistas el:

- ijk.aligilo@tejo.org por aliĝiloj
- ijk.programo@tejo.org por la tema kaj distra programoj
- ijk.vizoj@tejo.org por vizaj demandoj
- ijk@tejo.org por ĝeneralaj demandoj rilate al la IJK

Ni ankaŭ havas retan aliĝadministran sistemon, kiun vi povas uzi kaj modifi laŭ viaj bezonoj (aŭ vi povas programi vian propran, se vi preferas).

Plej grave, el financa vidpunkto, TEJO kovras duonon de eventuala deficito - oni neniam scias kio kaj kiam povas okazi. Sed tio venas kun alia ligita kondiĉo: Se estos profito, vi ricevos trionon de ĝi kaj la aliaj du trionoj eniras la kurantan konton de TEJO kaj la “Rezervo IJK” (kaj al la fonduso “Partoprenu IJK”). Tio ne signifas ke TEJO profitas de la fakto ke vi organizas IJK-n, kaj mem ripozas - tutmale. La mono eniras la “Rezervon IJK” por helpi ontajn LKK-ojn kaze ke ili farus deficiton (TEJO ja ne mem povas produkti monon ;-)). Aldone, se la fondaĵo “Partoprenu IJK”, parto de

tiu poto, enhavas sufiĉe da mono, tiam vi povas uzi ĝin por subvencii la partoprenon de nepagipovaj IJK-partoprenantoj.

TEJO / UEA bedaŭrinde ne faras invitleterojn por partoprenantoj el landoj kiuj bezonas vizon por eniri vian landon. Ni volonte konsilas vin pri la afero, sed la LKK kunlabore kun via LS mem devas okupiĝi pri tio. Tamen, ni kreis retan avertan liston pri partoprenuntoj, kiuj volis profiti de la IJK-aj vizoj por havi vizon sed ne partopreni la IJK-n. Tial, kaj pro milo da aliaj organizaj kialoj, bonas laŭeble plej rapide en la preparado de la kongreso eki bonajn rilatojn kun lokaj kaj ŝtataj oficialaj instancoj - kelkfoje ili forte povas subteni vin en via laboro. Cetere, via respondeculo pri vizaj aferoj havos aliron al tiu listo. Se vi havas problemojn kun partoprenontoj, kiuj provis misuzi la IJK-n por ekhavi vizon, tiam vi kompreneble ankaŭ povas aldoni ŝlin al la listo.

Kion TEJO atendas de vi

Vi organizos la IJK nome de TEJO, per aliaj vortoj, vi "luas" la nomojn "TEJO" kaj "IJK" por organizi la aranĝon en via lando. Ligite al tio estas kelkaj kondiĉoj flanke de TEJO (ili estas ankaŭ menciitaj en la TEJO-regularo - vidu sube).

Koncerne TEJO-programerojn, TEJO bezonas disponeblan ĉambron por ĝia komitatkunsido dum kelkaj horoj dum la tago (prefere posttagmeze). TEJO ankaŭ rezervas unu el la vesperoj por fari TEJO-vesperon. Aldone TEJO bezonas lokon por havi sian budon dum la tuta semajno. Tie ĝi reklamas por TEJO kaj la onta IJK. Aldone estus bone, se la TEJO-estraro havus disponeblan kunsidejon dum la tuta semajno.

De la financa flanko gravas, ke ĉiuj partoprenantoj sub 30 jaroj devas esti TEJO-membroj aŭ krompagi sumon pli alta ol al la plej multekosta TEJO-membreco. Parolante pri financoj, TEJO ankaŭ postulas licencpagon de 5% kaj por la uzo de la nomo "IJK" kaj "TEJO", kaj por la servoj (informado, retadreso ks.).

TEJO ankaŭ forte rekomendas ke vi asekuru viajn partoprenantojn por la kazo de malsano kaj por la kazo ke ili (aŭ vi) ion rompas.

Laste TEJO ege scivolemas pri la stato de la organizado. Tial membras en la LKK ankaŭ sperta aktivulo pri aranĝoj nomumita de la TEJO-estraro (kutime la "estrarano aŭ komisiito pri kongresoj/ijk"). Ŝli sekvas la preparlaboron kaj donas konsilojn laŭbezone. Ŝli ankaŭ ĉeestos minimume unu LKK-kunsidon, prefere en la tempoperiodo ekde februaro ĝis aprilo por kontroli la ejojn kaj por konatiĝi kun la aktivuloj. Ne timu, la TEJO-reprezentanto ne estas spiono, sed simple helpanto de TEJO. Aldone la TEJO-estraro atendas ke vi regule (ĉiujn 2 monatojn) raportas pri la progreso en la preparlaboro.

Buĝeto

La buĝeto aspektas kiel unu el la plej malfacilaj partoj de la kandidatiĝo, sed fakte, se vi sekvas kelkajn regulojn, ĝi facilas. La buĝeto ne estis kreita por vin ĝeni. Ĝi estas por vi helpilo, kiu serioze pripensigas vin, ĉu certaj viaj ambiciaj ideoj estas aŭ ne estas realismaj el la financa vidpunkto. Bona kaj respektata buĝeto savos vin de multaj malagrablaĵoj poste. Jen kelkaj nepraj eroj ĝiaj:

- TEJO-licencpago: TEJO kolektas 5% el ĉiuj kotizoj (difinitaj kiel Program-, Loĝ- kaj Manĝ-kotizoj). Licenco pagendas por uzi la nomojn "IJK" kaj "TEJO". TEJO pruntas al la organizantoj sian nomon kaj per tio ĉi ankaŭ la mondfama marko "IJK". La licencpago helpas kovri la kurantajn kostojn de TEJO, do ĝi gravas por ĝia movada laboro.
- La poto "Diversaj kostoj" estas 10% el ĉiuj enspezoj. Ĝi funkcias kiel kusensekurigilo por neantaŭvideblaj kostoj dum la kongreso, ekz. se iu rompas pordon aŭ liton, monpunoj ks. Se via lando spertas fortan inflacion aŭ aliajn ekonomiajn malstabilaĵojn, rekomendindas preni pli grandan elcentaĵon. Tio al vi donos plian asekuron kontraŭ ekz. neatenditaj prezŝanĝiĝoj aŭ kurzŝanĝigoj. Kotizojn vi ja fiksas pli ol jaron antaŭ komenco de viaj ĉefaj elspezoj.

- “Vojaĝado LKK”: Ne forgesu, ke la oficiala reprezentanto de TEJO ĉeestos minimume unu el la LKK-kunsidoj kaj ke ŝliaj vojaĝkostoj estas kovritaj de la poto “Vojaĝado LKK”.
- “Rekompencoj”: Vi ja multe laboras por la IJK kaj por ke ĝi bone funkciu. Pro tio vi ankaŭ meritas rekompencon por via laboro dum la IJK. La rekompenco por unu LKK-ano aŭ helpanto ne povas esti pli granda ol la ekvivalento de la kotizo (programkostoj, manĝoj kaj dormebleco). Kiom multe vi rekompencas, dependas de la decido de la LKK. Kutime la sumo de rekompenco egalas al la laboraj kvantoj kaj kvalitoj de unuopaj LKK-anoj kaj helpantoj, kaj ankaŭ dependas de kiom profita la IJK estis.
- Kongresaj memoraĵoj kaj t-ĉemizoj ne eniras la buĝeton - TEJO ne pretas peri la financan riskon por ili, se la produktado mem pli kostas ol la venditaj produktaĵoj enspezigas (kaj kutime estas tiel). Se vi tamen volas pretigi ilin por la partoprenantoj, tiam vi devas buĝeti ilin aparte el propra aŭ landsekcia monfonto.
- Kotiztabelo: La IJK estas aranĝo por ĉiuj membroj de TEJO (la aĝlimo por TEJO-membreco estas 30 jaroj) kaj la kotiztabelo respegulu tion laŭ eble. Kiam vi planas aĝkategoriojn, tiam bona modelo estas sub 20, 20 ĝis 30 kaj super 30. Aldone, kiam vi pripensas landajn kategorojn, tiam pripensu ili el la perspektivo de via lando. Por kiuj multekostas vojaĝi al via lando? Kiam temas pri foraj landoj, eĉ se ili ŝajne estas riĉaj, la vojaĝkostoj povas esti sufiĉe altaj. Ĉiukaze, se vi havas demandojn la TEJO-respondeculo pri IJK estas tie por helpi vin.
- Rabato por TEJO-estraro: La estraro de TEJO ricevas 50% rabaton de la kotizo (programo, loĝado kaj manĝado) dum la IJK. 25% estas kovrita el la IJK-a buĝeto, 25% de TEJO (vidu “Reglamento pri la estraro”).

Kiel kandidatiĝi

Se vi interesiĝas pri organizi IJK-n, tiam turnu vin al la TEJO-respondeculo pri IJK. Simple skribu al estraro.ijk@tejo.org kaj anoncu vian ideon. Ĉiam bonas frue anonci - ideale 2 jarojn antaŭe. Por oficiale kandidatiĝi vi devas al la TEJO-estraro prezenti buĝetan skizon kaj invitilon antaŭ la 15a de decembro (limdato) 1 1/2 jaro antaŭ ol vi planas organizi la IJK-n. La invitilo devas enhavi la sekvajn rubrikojn:

- Loko
- Datoj
- Ejo(j)
- Loka Kongresa Komitato
- Propono pri la kongresa temo
- Informoj pri la programoj tema, distra kaj vespera
- Kotiztabelo kun rimarkoj
- Buĝeto (en aparta dosiero)

TEJO jam kreis modelan buĝeton kun la eroj kiujn ni konsideras gravaj por la IJK. Ni forte rekomendas al vi uzi ĝin, ĉar ĝi baziĝas de plurjara sperto de IJK-organizado kaj enhavas kelkajn devigajn erojn. Vi povas peti ĝin al TEJO,

Kompreneble vi povas turni vin al la TEJO-respondeculo pri IJK por havi helpon pri plenumo de la dokumentoj. Ambaŭ dokumentoj haveblas ĉe la respondeculo kaj ankaŭ elŝuteblas el la reto ĉe http://www.tejo.org/ijk/ijkkand.jsp.

Kiam TEJO ricevos vian kandidatiĝon, ĝi estos pritraktita ene de la TEJO-estraro kaj eventuale ankaŭ ene de la TEJO-komitato. La decido estas farota ĝis la 1a de februaro post la kandidatiĝo. Tiel vi ricevos respondon en bona tempo por ke vi povu ekvarbi kaj disdoni jam pretajn aliĝilojn dum la IJK kaj aliaj someraj aranĝoj antaŭ via IJK.

Estu pretaj, ke dum pritraktadoj de via kandidatiĝo TEJO petos vin fari kelkajn modifojn al la buĝeto kaj la invitilo. Surbaze de la novaj versioj vi pretigos kontrakton kun TEJO / UEA. La kontrakto devas esti aprobita de la TEJO- kaj sekve UEA-estraro ĝis la 15a de majo. La kondiĉoj por organizi IJK-n estas klare difinitaj en la Regularo de TEJO kaj sube vi trovos la parton koncerne IJK-n. Evidente, ankaŭ ĉiuj modifoj en la buĝeto post ĝia aprobiĝo (aldonado de novaj eroj ks.) devas esti aprobitaj de la TEJO-estraro.

Raporto

Tio ja estas en la estonto, sed post la IJK vi devas verki raporton pri la IJK kun la finkalkulo. Tio donas superrigardon pri kiom da mono vi enspezis kaj elspezis (pli malpli la buĝeto, sed kun la veraj elspezoj anstataŭ anticipitaj sumoj) - pro tio ege gravas, ke vi konservu ĉiujn kvitancojn, fakturojn ks. por dokumenti elspezojn kaj enspezojn. Ni ŝatus havi la raporton ĝis la 15a de decembro post la IJK.

Laste, TEJO ege dankus vin, se vi transdonus viajn spertojn al la sekvaj IJK-organizantoj. Ankaŭ se vi havas komentojn aŭ aldonojn rilate al tiu ĉi broŝuro ni ĝojus aŭdi de vi!

TEJO deziras al vi interesan laboron kaj sukcesan organizadon! Se vi havas demandojn, komentojn aŭ problemojn, tiam ne hezitu kontakti nin - ni ĉi-tieas por helpi vin!

Utilaj retpaĝoj

- IJK-retpaĝo: http://www.tejo.org/ijk
- Aktivula trejnado: http://www.tejo.org/at
- Artista datenbazo: http://artista.ikso.net
- TEJO-Regularo: http://www.tejo.org/aktivuloj/regularo /regularo.php
- IS-organizantoj: http://www.esperanto.de/dej/aktivuloj/kkren_eo.php

Anekso A: El la TEJO-regularo: ĈAPITRO 7 - INTERNACIA JUNULARA KONGRESO

1. Okazigo kaj karaktero

TEJO ĉiujare okazigas sian internacian junularan kongreson ("IJK"), kiu estas manifestacio de la tutmonda esperantista junulara komunumo kaj celas plifortigi la interkomprenon kaj amikecon inter junuloj de ĉiuj landoj.

2. Invito

La kongreson invitas landa sekcio aŭ, se mankas landa sekcio en la kongresa lando, alia esperanta organizo.

3. Kongresa kontrakto

I. La kongreso okazas laŭ kontrakto farita de TEJO kun la invitanto.

II. La kongresa kontrakto devas enhavi la jenajn kondiĉojn:

A. la kongreson organizos landa kongresa komitato laŭ buĝeto aprobita de TEJO kaj de la estraro de UEA;

B. la kongreso respektos la statuton kaj regularojn de UEA;

C. la kongresanoj kontraktos pri sia partopreno kun la invitanto aŭ la landa kongresa komitato;

D. la kondiĉoj de la unuopaj kontraktoj de partopreno devos esti aprobitaj de TEJO;

E. la kongreso pagos al UEA por la kredito de la junulara fondaĵo sumon egalan al 5 procentoj de ĉiuj enspezitaj kotizoj (program-, loĝ- kaj manĝ-kotizoj);

F. se la centra oficejo administros iun kotizon, ĝi subtrahos makleraĵon de maksimume 5 procentoj;

G. la eventuala profito de la kongreso apartenos trione al UEA por la kredito de la junulara fondaĵo, trione al UEA por la kredito de la rezervo IJK kaj trione al la invitanto;

H. la eventualan deficiton de la kongreso transprenos:

1. unuavice la rezervo IJK (aŭ, se ĝi elĉerpiĝos, la junulara fondaĵo), sed nur ĝis la pli malalta el:

a) dudekono de la sumo de la buĝetitaj kostoj; kaj

b) triono de la kredita saldo de la rezervo IJK en la dato de la kongresa kontrakto; kaj

2. duavice, po duone, la junulara fondaĵo kaj la invitanto; kaj

I. la landa kongresa komitato regule raportos kaj al TEJO kaj al la estraro de UEA pri la evoluo de la kongresaj financoj.

Anekso B: El reglamento pri la estraro

6. Repago de kostoj

1. Estrarano rajtas al repago de labor-kostoj kaj al repago de vojaĝ- kaj restad-kostoj por partopreni estraran kunvenon kiu ne okazas dum la Internacia Junulara Kongreso. Estrarano ankaŭ ĝuas rabaton de 50 % al la kotizo

por partopreni la Internacian Junularan Kongreson; la Landa Kongresa Komitato rabatas 25 % de la normala kotizo kaj la Organizo rabatas plian 25 %. Neniu alia kosto povas esti repagita sen decido de la Komitato.

2. La Estraro povas fari regulojn por priskribi a limigi la rajton al repago de kostoj.

Anekso C: Modelo: Kontrakto inter UEA / TEJO kaj LKK por IJK 20XX

Kontrakto inter Universala Esperanto Asocio (UEA) kiu agas pere de sia junulara sekcio Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj NOMO (MALLONGIGO) pri okazigo de la XXa Internacia Junulara Kongreso (IJK) en 20XX en LOKO, LANDO.

Art.1. Ĝenerale

1.1. La Internacia Junulara Kongreso (IJK) estas la ĉiujara kongreso de TEJO, kiu estas manifestacio de la tutmonda Esperantista junulara komunumo kaj celas plifortigi la interkompreniĝon kaj amikecon inter junuloj de ĉiuj landoj. (TEJO-regularo ĉap 7.1.)

1.2. La IJK okazos inter la DATO ĝis DATO en LOKO, LANDO.

1.3. La IJK estos organizata de Landa Kongresa Komitato (nomata LKK) de la XXa IJK kunlabore kun aliaj aktivuloj de TEJO.

1.4. La ĉeftemo de la kongreso estos "TEMO". "La kontraktantaj partioj interkonsentu aparte pri la programo, kiun ĉefe proponas la LKK. La TEJO-estraro devas aprobi la programskemon proponitan de LKK. La kunsido de la komitato de TEJO estas nepra parto de la programo de la kongreso. Laŭeble la programo ankaŭ inkluzivu Aktivula Trejnado, TEJO-vespero, TEJO-estraro respondas k.s.

Art.2. Financoj

2.1. La kongresajn financojn administros la LKK.

2.2. La Kongreso estas organizata laŭ buĝeto aprobita de TEJO kaj la estraro de UEA, aldonita al tiu ĉi kontrakto (vd. Anekson 2). Ĝi estos financata el aliĝkotizoj, donacoj, subvencioj kaj aliaj rimedoj. (TEJO-regularo, ĉap 7.3.i.)

2.3. La LKK rajtas modifi la buĝeton, sed la kvanto de la ŝanĝo ne rajtas esti pli ol 15% de la buĝetita sumo. Alikaze la modifoj bezonas la aprobon de TEJO.

2.4. Se ĝi tion bezonas, la LKK povas ricevi monprunton de TEJO laŭ kondiĉoj aparte interkonsentendaj inter la TEJO-estraro kaj la LKK. Monprunto devas esti repagata al TEJO plej laste semajnon post la aprobo de la financa raporto pri IJK fare de la TEJO-estraro.

2.5. La kongreso pagos al TEJO por la kredito de la junulara fondaĵo sumon egalan al 5% de ĉiuj enspezitaj kotizoj. (TEJO-regularo, ĉapitro 7.3.2.v.). LKK respondecas pri la transpago de tiu sumo kaj devas efektivigi la transpagon ĝis inkluzive la 15a de oktobro 20XX.

2.6. Individuaj membroj de TEJØUEA (inkluzive tiujn, kiuj aliĝis al la organizo dum la kongreso) je la kongresa akceptiĝo rajtas ne pagi malrabaton. La LKK, aŭ TEJO-respondeculo aldonata al la akceptada teamo, kolektas membrokotizojn dum la akceptiĝo kaj transpagas ilin al TEJO ĝis inkluzive la 15a de oktobro 20XX. Partoprenantoj rajtas pagi sian TEJØUEA kotizon samtempe kun la pago de la partoprenkotizo.

2.7. Plej malfrue je la 15a de de oktobro 20XX la LKK sendas al la Centra Oficejo de TEJO datumbazon de ĉiuj aliĝintoj, kun indikoj de tiuj kiuj surloke aliĝis al TEJØUEA.

2.8. La LKK disponas pri la konto ijkb-b en la periodo 15.10.20XX gxis 15.10.20XX. Pagordonoj estas farita de la kasisto de LKK al la librotenisto de UEA kaj kopie al la kasisto de TEJO. Partoprenontoj povas pagi sian kotizon al tiu UEA-

konto sub indiko de IJK 20XX. La Centra Oficejo informos la LKK-n minimume je la unua tago de ĉiu monato pri la enhavo de la konto kaj la ricevo de kotizoj, kaj laŭpete rapide transpagos la kotizojn al la LKK.

2.9. La LKK preparos la finkalkulon de la XXa IJK ĝis la 31a de novembro 20XX. Se ĝis tiam la financa raporto ne pretas la restanta bonhavo en la konto ijkb-b estos transdonata al TEJO. Male, se TEJO ne fintraktos la financan raporton ĝis la 1a de marto 20XX la restanta bonhavo en la konto ijkb-b estas transdonata al la LKK. La kompletan librotenadon rajtos kontroli interalie la kongresaj revizoroj nomumitaj de TEJO. Tiukaze, ili finas la kontroladon plej malfrue du monatojn post la ricevo de la finkalkulo kaj librotenajn dokumentojn. TEJO transprenas ĉiujn kostojn de la kontrolado. Tiu-okaze la limdato por fintrakti la raporton fare de la TEJO-estraro estas la 1a de majo 20XX.

2.10. La eventuala profito de la kongreso apartenos trione al UEA por la kredito de la junulara fondaĵo, trione al UEA por la kredito de la rezervo IJK kaj trione al NOMO. Ĝi estas pagenda plej laste unu monaton post aprobo de la kongresa finkalkulo fare de la estraro de TEJO.

2.11. Eventualan deficiton de la kongreso transprenos la kontraktantaj flankoj laŭ la priskriboj de TEJO-regularo Ĉapitro 7 artiklo 3.2.viii. Ĝi estas pagenda plej laste unu monaton post la aprobo de la finkalkulo de la kongreso fare de la estraro de TEJO.

2.12. La LKK minimume je la unua tago de ĉiu monato raportu kaj al Financa Komisiono de TEJO (se tia ekzistas) kaj al la estraro de TEJO kaj UEA pri la evoluo de la kongresaj financoj. (TEJO-regularo, ĉap 7.3.ih. adaptita) Tiu ĉi kondiĉo validas ĝis la finkalkulado estas preta.

Art.3. Aliĝkondiĉoj

3.1. La LKK respondecas pri la publikigo de la aliĝilo. La aliĝilo devas esti aprobita de la TEJO-estraro antaŭ sia publikiĝo.

3.2. Aliĝoj ekvalidas nur je la forsendodato de la minimuma antaŭpago. Aliĝintoj devas konservi pruvilon pri la dato de la forsendo kaj prezenti tiun al la LKK en dubindaj kazoj. Alikaze validas la dato de la alveno ĉe la kontoj disponataj de UEA kaj la LKK.

3.3. Partoprenkotizo, pagenda de ĉiu aparta plenpaganto, konsistas el kosto de loĝado (en pensiono, junulargastejo aŭ amasloĝejo), manĝo kaj la programkotizo, ekde vespermanĝo la DATO ĝis inkluzive la matenmanĝon la DATO.

3.4. Partoprenkotizo, pagenda de ĉiu aparta memzorganto, konsistas el kosto de loĝado (en pensiono, junulargastejo aŭ amasloĝejo) kaj la programkotizo, ekde vespero la DATO ĝis inkluzive mateno la DATO.

3.5. Loĝado en la pensiono aŭ junulargastejo estas garantiita al aliĝinto nur post ricevo de konfirmilo kiun sendas la LKK.

3.6. Malaliĝi eblas ĝis inkluzive la 31a de majo 20XX. Kaze de valida malaliĝo la LKK repagas la duonon de la deviga antaŭpago. LKK ne repagas la antaŭpagon por la invitletero.

3.7. Eblas transdoni antaŭpagon nur al ne-aliĝintoj. La LKK alĝustigas la kotizon sed ĝi ne povas malplialtiĝi. La transprenanto devas prezenti skriban atestilon de la transdonanto. Ne eblas transdoni pli ol unu antaŭpago al unu persono.

3.8. La kotizo por parttempaj partoprenantoj estas lia/ŝia koncerna, dividita per kvin kaj multobligita per la nombro de partoprentagoj.

3.9. Ĉiuj monsumoj kaj aliĝlimdatoj estas menciitaj en la kotiztabelo. Ni forte rekomendas ke ĉiuj monsumoj estas aŭ en euroj aŭ dolaroj.

Art.4. Komunikado inter TEJO kaj LKK

4.1. TEJO traktos ĉiujn aferojn rilatajn al IJK kun la LKK.

4.2. La LKK minimume je la unua tago de ĉiu monato raportu kaj al estraro de TEJO kaj respondecaj komisionoj de TEJO (laŭ la distingo priskribita en Ĉap. 4.3) pri la evoluo de la kongresaj aferoj. La raportado okazu ekde kiam la LKK kaj TEJO principe interkonsentis pri la organizado de la IJK, ĝis kiam finpritraktiĝis ĉiuj IJK-rilataj aferoj post la kongreso.

4.3. La monata raporto de la LKK al TEJO-estraro konsistu el minimume la sekvaj rubrikoj: 1) programo, 2) financoj, 3) administrado (t. e. aliĝintoj laŭ aĝkategorioj), 4) varbado kaj informado, 5) eksteraj rilatoj, 6) diversaĵoj.

4.4. La uzata lingvo por la komunikado inter TEJO kaj la LKK, kaj por ĉiuj internaj dokumentoj de la LKK, estu nur Esperanto.

4.5. Post la fintrakto de ĉiuj kongresaj aferoj, la LKK transdonas la originalon aŭ kopion (inkluzive la ciferecajn) de la tuta arkivo de la IJK al la Centra Oficejo de TEJO. Ili restu en la arkivo de TEJO dum minimume 10 jaroj.

Art.5. Disdivido de respondecoj

5.1. Flanke de la LKK ĉefrespondecas la LKK-kunordiganto, flanke de TEJO ĉefrespondecas la TEJO-estrarano kiun tiucele nomumas la TEJO-estraro.

5.2. Flanke de la LKK estas elektitaj respondeculoj por minimume la sekvaj respondecoj (po unu persono): 1) LKK-kunordiganto 2) programo, 3) financoj 4) administrado 5) varbado kaj informado, 6) eksteraj rilatoj.

5.3. La nomoj de la respondeculoj priskribitaj en la Art. 5.1. kaj 5.2. aldoniĝas en anekso 1 de tiu ĉi kontrakto. Aldone respondecas flanke de TEJO la koncernaj estraranoj.

5.4. La LKK respondecas pri la logistiko, teknika ekipaĵo, kongresejo, realigado de programo kaj administrado.

5.5. Ambaŭ kontraktantaj partioj reklamas por la kongreso laŭ siaj ebloj.

5.6. TEJO respondecas pri la tutmonda reklamado per siaj informrimedoj.

5.7. La LKK sendos al ĉiuj aliĝintoj konfirmilon kun detalaj informoj rilataj al kongreso. Same ĝi respondecas pri eldono de la kongresa broŝuro. La LKK sendos kontraŭpage oficialan invitleterojn al aliĝintoj, kiuj tion bezonas.

5.8. La LKK tenas arkivon de ĉiuj kongresaj aferoj dum minimume unu jaro post IJK.

Art.6. Finaj vortoj

6.1. Ambaŭ kontraktantaj partioj konsentas malferme konsulti unu la alian por ricevi konsenton antaŭ ol entrepreni agon, kiu povus eventuale kontraŭi la vortumon aŭ la spiriton de ĉi tiu kontrakto.

6.2. Tiu ĉi kontrakto ne kontraŭas regularojn kaj statuton de UEA kaj la regularon de NOMO. En kazo de disputo la kontraktantaj partioj nomumas po unu propran arbitraciulon kaj unu reciproke akcepteblan arbitraciulon. La decido de ĉi tiu arbitracia komisiono surbaze de ties interpretado de tiu ĉi kontrakto estos la fina vorto.

6.3. La kontrakto ekvalidas post ĝia subskribo de la oficiala reprezentanto de la TEJO-estraro, de UEA kaj de reprezentanto de NOMO.

6.4. La kontrakto estas subskribita en tri kopioj, unu el kiuj ricevas TEJO, unu UEA kaj la tria NOMO.

Subskribita la (dato) de la Ĝenerala Direktoro de UEA, Estrarano de TEJO kaj LKK-kunordiganto

Anekso 1 – Respondeculoj flanke de la LKK

Pri la kampoj menciitaj en punktoj 5.1 kaj 5.2 flanke de la LKK respondecas jenaj personoj:

LKK-kunordiganto:

Programo:

Financoj:

Administrado:

Varbado kaj informado:

Eksteraj rilatoj:

TEJO-estrarano:

Anekso D: Fina Raporto de la Komitata Laborgrupo pri Kongreskotiza Sistemo

raportas: Ilja De Coster (TEJO-Komisiito)

http://esperanto.org/tejøkomisionoj/KLKS/e-KLKS.html (24.08.2006)

Enkonduko

Post pli ol unu jaro da ne ĉiam same intensa laboro, nun veni tempo por konkludi la laboron de la Komitata Laborgrupo pri Kongreskotiza Sistemo (KLKS). La laborgrupo fondiĝis dum la TEJO-Komitatkunsidoj en Asissi en la jaro 1997. Tiam en la Komitato estis vigla diskuto pri la jes aŭ ne nuligo de la tiel nomata 50%-a regulo, sed oni ne sukcesis trovi kontentigan kompromison. La konkludoj, kiujn nun prezentas la laborgrupo al vi, fakte estas ne pli ol listigo de kelkaj konsiloj kaj ideoj pri kiel aspektu la kotizsistemo.

La antaŭ-historio

La 50%-a regulo estiĝis en la TEJO-komitatkunsidoj de 1993 dum la IJK en Vraca. La celoj estis noblaj, nome ebligi ke ankaŭ junuloj el malriĉaj landoj povu partopreni la IJK-on. Tiucele la Komitato dividis mondon en du partojn: riĉaj landoj (A-landoj) kaj malriĉaj (B-landoj). Decidiĝis ke la B-landanoj nur pagu 50% de la kotizoj de la A-landanoj. Sed tiu ĉi decido, kiu eniris historion kiel la '50%-a regulo' aŭ 'decido de Vraca', evidentiĝis praktike ne uzebla. La IJK-oj en Koreio ('94), en Rusio ('95) ne aplikis la regulon. Diskutoj rezultiĝis en adapto de la regulo dum la Komitatkunsido de 1995 en Serovo tiel ke "La LKK rajtas, konsulte kun la Estraro de TEJO, fiksi maksimuman kvanton de partoprenantoj kiuj rajtas je la 50%a rabato". Tiu ĉi adapto uziĝis por la IJK en Assisi ('97), kie nur la 100 unuaj aliĝintaj B-landanoj povis profiti 50%an rabaton. Sed per strikta apliko de tiu ĉi adapto ankaŭ eblas tute neglekti la spiriton de la decido de Vraca, fiksante la maksimuman kvanton je 0. Tio fakte estas kion unue faris la Kroata LKK por la IJK en Rijeka ('98). Rezulte en 1997 denove estis ardaj diskutoj en la TEJO-Komitato, diskutoj kiu foje estis pli ardaj ekster la oficialaj kunsidoj. Tra pluraj diskutoj kun diversaj homoj verkiĝis du kompromisoj. Unu propono "petas la estraron pristudi la eblecojn pri justaj sed samtempe realismaj kotizsistemoj por la estontaj IJK-oj" kaj "proponas ne nun en Assisi pristudi kaj decidi alian kotizsistemon, sed atendi raporton de la estraro (helpe de eventuale komisono), kaj nur decidi surbaze de serioze pristuditaj eblecoj dum venonta komitatkunveno". Tiu ĉi propono unuanime estis akceptita kaj pluraj homoj sin anoncis por kunlabori en laborgrupo por esplori la eblecojn. Dua propono "petis detalan klarigon" por la ne-respekto de la 50%a regulo en la kotizoj por Rijeka kaj "rekomendas al la estraro almenaŭ parte respektigi la 50%-regulon." Ĉi lasta okazis: la TEJO-estraro kaj la LKK interkonsentiĝis pri 50%a rabato por la unuaj 60 aliĝintaj ne memzorgantaj B-landanoj.

Baze de tiuj ĉi akceptitaj proponoj eklaboris laborgrupo, TEJO-KLKS: TEJO-Komitata Laborgrupo pri Kongreskotiza Sistemo. Unue ĝi laboris sub gvido de Miquel Gómez i Besòs (TEJO-estrarano pri kongresoj), baldaŭ poste sub gvido de Ilja De Coster, (TEJO-komitatano, kaj poste ankaŭ -komisiito). Pluraj homoj siamaniere kontribuis en la laboro de laborgrupo, kiu ĉefe funkciis retpoŝte.

Konkludoj de la laborgrupo

Laŭ la laborgrupo kotizsistemoj elverkiĝu baze de solidarecaj principoj, tiel ke pli fortaj (el financa vidpunkto) partoprenantoj penu iel subteni la partoprenon de pli malfortaj partprenantoj. Sekve ilia kotizo estu iom pli alta por per

tiu plia parto pagi la partoprenon de tiuj kiuj ne povas same elspezi por vojaĝo kaj partopreno. Nur tiel eblas realigi plej internaciecan IJK-on.

1. Pri landaj kategorioj

La simpla divido inter riĉaj kaj malriĉaj landoj (la sistemo de A-landoj kaj B-landoj), evidentiĝis malrealisma. Estas klare ke ekzistu pliaj kategorioj. Kiom da kategorioj kaj kiel dividi ilin ne estas facilaj demandoj, sed klaras ke la divido de la landoj 'laŭsente' ne estas la plej bona. La divido inter landaj kategorioj postulas kompetentecon kaj tempon kiun nek TEJO nek la organizantaj LKK-oj havas, tial la laborgrupo konkludas ke estas pli taŭga transpreni rangigon jam fiksitan de kompetentaj organizoj. Post pristudo, la laborgrupo konkludas uzi la tiel nomatan HDI. La HDI (Human Development Index - Indekso de Homa Evoluiĝo) estas rangigo de landoj baze de diversaj soci-ekonomiaj kriterioj, uzata de la UNDP (United Nations Development Programme - Evoluiga Programo de Unuiĝintaj Nacioj). La kvanton de landkategorioj la laborgrupo konkludas fiksi je 5: 4 por la 10 unuaj landoj en la HDI kaj 5a kategorio por ĉiuj ceteraj landoj. Konklude, de altkotiza al malaltkotiza, ni proponas la sekvajn kategoriojn:

Kategorio A: Kanado, Francio, Norvegio, Usono, Islando, Nederlando, Japanio, Finlando, Novzelando, Svedio.

Kategorio B: Hispanio, Austrio, Belgio, Australio, Britio, Svisio, Irlando, Danio, Germanio, Grekio.

Kategorio C: Italio, Israelo, Luksemburgio, Portugalio, Malto, Slovenio, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Pollando.

Kategorio Ĉ: Belorusio, Rusa Federacio, Bulgario, Estonio, Litovio, Kroatio, Rumanio, Makedonio, Turkmenistano, Latvio.

Kategorio D: Ĉiuj ceteraj

Evidente, tiuj ĉi kategorioj regule estu aktualigitaj laŭ la (regule aperantaj) novaj ciferoj de la HDI.

2. Pri aĝkategorioj

La laborgrupo proponas konservi la ekzistantajn aĝkategoriojn (ĝis 18, inter 19 kaj 25 kaj post 26 jaroj) kaj la diferencojn en la kotizoj.

3. Pri aliĝlimdatoj

La laborgrupo proponas konservi la ekzistantajn aliĝlimdatojn kaj la diferencojn en la kotizoj.

4. Pri eblaj kromaj rabatoj

Grava parto de la laboro de la laborgrupo estis la diskuto pri diversaj eblaj rabatoj al IJK-partoprenantoj pro specifaj kialoj. Jen ni listigas eblajn kialojn por rabatoj. Pri kiuj rabatoj kaj ilia grandeco libere decidu la LKK-oj, interkonsulte kun la TEJO-estraro, konsiderante la tipan situacion de la tiujara IJK.

4.1. Rabatoj pro distancoj

La laborgrupo konstatas ke por pluraj IJK-partoprenantoj la vojaĝkostoj estas (foje eĉ multe) pli altaj ol la kotizo mem. Ili de for venu kaj do pagu multekostan flugbileton. Konsiderante la strebon de TEJO havi vere internaciajn kongresojn, la LKK povas doni rabatojn al tiuj kiuj venas el lando for de la kongreslando. Pri kiom granda estu la distanco kaj kiom alta estu la rabato libere decidu la LKK-oj, interkonsulte kun la TEJO-estraro, konsiderante la tipan situacion de la tiujara IJK.

4.2. Rabatoj por IJK-kontribuantoj

Pluraj partoprenantoj siamaniere kontribuas al la IJK, ĉu programe, ĉu organize. La laborgrupo opinias utile sisteme uzi rabatojn por stimuli iajn kontribuojn. Ni ne nur pensas pri prelegantoj aŭ koncertantoj, sed ankaŭ pri partoprenantoj

kiuj pretas dum iu tempo helpi la LKK-on (ekz.: per purigado, deĵorado en trinkejøGufujo, kopiado kaj alia administra helpo, ktp) aŭ TEJO-on (ekz.: deĵoradi en TEJO-budo, kopiadi dokumentojn por la komitato, ktp). Bonus se la LKK faras listojn de la bezonataj volontulaj taskoj, tiel ke partoprenontoj sin de antaŭe povas anonci por tia laboro). Pri kiom alta estu la rabato kaj pri konkreta regularo de la rabatoj libere decidu la LKK-oj, interkonsulte kun la TEJO-estraro, konsiderante la tipan situacion de la tiujara IJK.

4.3. Rabatoj pro socialaj kialoj

La laborgrupo ankaŭ pritraktis la ideon doni specifajn rabatojn al iuj sociaj grupoj, kiel ekz. senlaboreculoj, armeservantoj, sengepatruloj, ktp. Tamen ni devis konstati ke la situacioj de tiuj homoj tiel diferencas en la diversaj landoj, ke praktike ne eblas internacie fiksi kiaj kategorioj bezonus rabatojn. Pluse la donado de tiaj rabatoj signifus ege multe pli da administra laboro, kio por volontula LKK ne estas evidenta. Tamen, se la LKK opinias utila doni tiajn rabatojn, ĝi rajtas libere decidi pri tio, interkonsulte kun la TEJO-estraro, konsiderante la tipan situacion de la tiujara IJK.

5. Plenkotizantoj kaj memzorgantoj

La laborgrupo proponas konservi kaj pli vaste uzi la diversajn aliĝkategoriojn en alia preznivelo. La LKK-oj penu ĉiam doni la eblecojn ĉu loĝi en hotelo, ĉu en amasloĝejo, ĉu en propra tendo. Ankaŭ laŭeble la partprenantoj libere elektu ĉu manĝi en la manĝejo aŭ mem kuiri. Laŭ eblo la elekto kie loĝi estu sendepende de la elekto kie manĝi. Tiel ke estu ebla loĝi en la amasloĝejo sed tamen manĝi en la manĝejo, aŭ loĝi en la hotelo sed tamen memzorgante manĝi.

6. Fiksa kotizsistemo por ĉiuj IJK-oj

Vivis ideo ellabori detalan kotizsistemon por ĉiuj IJK-oj. Certe tio ŝparus tempon al la LKK-oj, sed tamen la laborgrupo konkludis ke tio ne estas oportuna. Ja ĉiu IJK, en alia lando, en sia maniero estas tipa, tiel ke sistemo taŭga por unu IJK ne nepre estu taŭga por alia IJK. Tial la laborgrupo proponas la la liberecon al la LKK-oj por, interkonsulte kun la TEJO-estraro, mem fiksi kotizsistemon por la koncerna IJK.

Proponoj de la laborgrupo

1. Konsiderante la praktikan neuzeblecon de la 50%a regulo, la laborgrupo proponas al la Komitato de TEJO nuligi tiun ĉi regulon.

2. Konsiderante la diversecon kaj el ekonomia kaj el geografia vidpunkto de eblaj IJK-gastigantoj, la laborgrupo konsilas al Komitato ne fiksi ajnan striktan simplan regulon pri la kongreskotizoj validan por ĉiuj IJK-oj.

3. La laborgrupo proponas al la Komitato de TEJO akcepti la supre priskribitajn konkludojn de la laborgrupo kiel konsiloj al la LKK-oj pri la farado de kotizsistemo, lasante al ili liberecon pri la konkreta ellaborado de la kotizsistemo.

4. La laborgrupo proponas al la TEJO-estraro konsideri la spiriton de la konkludoj de sia laboro kiam ĝi decidu pri la akceptado de kotiztabelo, kiel proponita de invitanta LS.